1-a Jaro, N-o 40

APERAS S.A.T. SEMAJNE

2. Julio 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

## Agresemo de angla kapitalo

La antagonismo inter laboro kaj kapitalo en Anglio dum lastaj semajnoj ekstreme akutiĝis.

En ĉiuj plej gravaj branĉoj de l'industrio — ŝipkonstruado, maŝinfabrikado, karbominejoj, domkonstruado kaj transporto, — la demando pri laborpago fariĝis urĝe solvenda. Tiu ĉi solvendeco signifas la komencon de l'periodo, dum kiu agresemaj entreprenistoj luktas por malaltigo de realkosta laborpago.

La lukto inter batale unuiĝintaj kapitalistoj kaj profsindikatoj nun ne havas karakteron de l'maldaŭra kaj okaza konflikto. La radikoj de la lasta estas pli profundaj kaj multebranĉaj; la granda skalo, kiu karakterizas tiun ĉi lukton, pravigas la aserton, ke l'nova paĝo en historio de angla laborista movado ĵus malfermiĝis.

La celo de l'anglaj kapitalistoj, kiun ili evidentigas per sia agresema konduto, estas malgrandigi elspezojn de siaj entreprenoj por laborpago ĝis tiu grado, kiam malpli karaj ol nun, fabrikatoj de angla industrio povos konkuri sur enlandaj kaj eksterlandaj merkatoj kontraŭ fremdlandaj industriaĵoj.

La metodo, per kiu anglaj kapitalistoj provas solvi la problemojn de l'eksporto el Anglio, ne estas nova. La tendenco senkostigi por si la embarasojn en industria produktado, prefere per pagoj el laborista poŝo, estas tute natura por ĉiuj entreprenistoj. La nova trajto de nuna luktperiodo estas tempa koincido de ĝi kun stabiligo de angla valuto laŭ ora parito[1].

De nun ekonomia organismo de Anglio devas akomodiĝi al novaj kondiĉoj, kreitaj de libere cirkulanta orvaluta funto!

Pro tio ĉi la atako de angla burĝaro kontraŭ ĝis-nuna nivelo de laborpago fariĝas plej energia. Laŭ ĉi-sube citataj statistikaĵoj oni povas facile konkludi, kiom akuta estas nun tiu demando kaj kian gravan rolon por enlanda ekonomio havas tiu ĉi faktoro.

Oni povis konstati, ke dum lastaj jaroj la meza nivelo de laborpago en Anglio estas la plej alta el ĉiuj ceteraj eŭropaj landoj. Por kompari anglajn normojn de laborpago kun la alilandaj sufiĉas citi el januara n-o de "Feder. Rezerve Bulletin" ciferojn pri taga laborpago de laboristoj, okupitaj ĉe diverslandaj uzinoj de iu granda usona firmao (en dolaroj): en Anglio — 2,28; Germanio — 1,55; Francio — 1,30; Belgio — 1,14; Italio — 0,96.

Londona revuo, "The Economist", konstatas, ke l'angla laboristo, okupita en metalindustrio, ricevas por semajno 3 f. 3 ŝl., dum la belga — 1f. 19 ŝl.; la franca — 1 f. 13 ŝl. kaj la germana — 2 f. 2 ŝl.

Nur en Usono la laborpago, dolare kalkulata, estas preskaŭ 2-oble pli alta ol en Anglio. Do laborpago de anglaj laboristoj, kiu kalkulate en ora valuto estas je 100 % pli malalta ol en Usono, estas samtempe preskaŭ samprocente pli alta ol en Francio, Italio, Belgio kaj je 50 % — en Germanio.

Tamen de tio ĉi ne estas konkludebla, ke la reala laborpago, laŭ aĉetpovo de laborista salajro, estas samgrade alta. Se oni esprimos ĉiujn viv-kostojn de Anglio en ora valuto (laŭ antaŭmilita parito de l'funto), tiam kompare al antaŭmilita prez-nivelo, — 100 —, oni por apartaj landoj ricevas jenajn gradojn: Anglio — 179, Germanio — 125, Italio — 121, Francio — 103.

Do tial estas kompreneble, ke l'konkurivo de Anglio kontraŭ alilanda industrio malfortiĝas ne tiom pro alteco de reala laborpago de enlandaj laboristoj, kiom pro relativa plialteco de enlandaj prezoj kompare kun tiuj en aliaj landoj. Laŭ konkludo de ŝtataj ekonomistoj tiuj prezoj eĉ estas pli altaj ol en Usono.

Do la plej urĝa tasko kaj proksima celo de anglaj kapitalistoj estas egaligi la laborkostojn kun alilandaj, t. e. alivorte — la neeviteblan elspezon por restarigo de ora valuto kompensi el poŝo de laboristoj . . .

Kio rezultos el tiuj ĉi tendencoj de angla burĝaro? Sendube la agresemo de angla kapitalo rezultigos porbatalan unuiĝon de angla laborista movado. La sama danĝero minacas al ministoj, fervojistoj, konstruistoj k. a. Do kreiĝas komuna bazo por kolektiva defendo de tutklasaj interesoj. Tiusencan opinion jam publike eldiris k-do Cook, sekretario de minista federacio. Aliflanke — povas plifortiĝi en internacia skalo la aktiveco de profsindikatoj en lukto por plialtigo de laborpago kaj mallongigo de labordaŭro.

Tiuj ĉi perspektivoj kompreneble ne konsolas la regantojn de Anglio. Akcelante malaltigon de laborpago, registaro samtempe serĉas la rimedojn por kompensi organizitan laboristaron per malgrandigo de labormanko. Sed tiu universala rimedo ankoraŭ ne estas trovita; anstataŭi ĝin ankaŭ ne povas nova leĝ-

[1] egalrajteco: ĉi tie = ekvilibra bazo de monvaluto. — *Red.*

projekto pri subvenciado de l'industrio, kiu nun reaperis sub nova masko.

Nuna registaro de Anglio, kun ĉefministro Bolduin neeviteble devas ŝanĝi sian politikon rilate al Sovet-Unio; nur vastigo de ruslanda merkato por angla eksporto estus radikala rimedo por elimini labormankon en Anglio.

*N. Krassovski.*

# Du Ruĝuloj Alilande

*Brita registaro timas alilandajn komunistojn. — Spite de malpermeso kaj akra kontrolo du sukcesas eniri. — Kaŝludo. — Surprizo dum la kongreso. — Vanaj provoj. — Ĉe "Daily Herald". — Salutojn al ministro Hicks! — Amuza kunveno de virinoj, policanoj kaj detektivoj.*

Ĉe laboristaj medioj ĉiaspecaj, kaj tute eble ĉe tiaj de la kapitalistaro, kiuj ankoraŭ povas ekkoni kaj ĝui ŝercartifikon, amuza distraĵo dum la lastatempaj libertempoj donis multe da plezuro. Dum pentekosto okazis en Glasgow, Skotlando, brita komunista kongreso, kaj la ministro de internaj aferoj zorge sciigis pro tio, ke al neniu komunisto eksterlanda estu permesate eniĝi en Grandan Britio — la liberan landon — por ĉeesti la kunvenon jam diritan.

Verŝajne, se nur britoj-komunistoj kunvenus, ne gravus, ĉio estus bona, kaj neniel malutilo rezultus. Sed la komunisto alilanda! Tute ne! Li estas kanajlo kaj tiu de la plej malbona tipo; for de li! Tamen "homo proponas, sed dio disponas",[1]) — tiuokaze, li troviĝis forme de du alilanduloj-komunistoj, kiuj spite de la malpermeso oficiala kaj la atentaj klopodoj de la policanaro, bone sukcesis eviti la aŭtoritatojn kaj dum la plena taglumo kaj sub la ĝustaj nazoj de la policanoj mem eniris la kunvenejon kaj partoprenis la kongreson! Tiom por la observemo de la policistaro.

Ĝis nun oni ne malkaŝis, kiel k-do *Stoecker,* ano de la Germana Kompartio kaj de la Reichstag, kaj k-dino *Lebel* el Francio eniris Britio kaj atingis la kunvenejon en Glasgow: oni diris, ke k-do Stoecker jam troviĝis en Glasgow dum kelkaj tagoj antaŭ la malfermo de la kongreso. K-dino Lebel alvenis lundon matene je pentekosto kaj, estas dirite, eniris la kongreshalon tra la ordinara ĉefpordo, dum ĉirkaŭe staris kelkaj policanoj-detektivoj. La delegitoj ĉeestantaj faris al k-do Stoecker grandan ovacion, samtempe li paŝis sur la estradon. "Mi tre fieras", li diris, "spite de ĉiuj klopodoj de kavaliro Joynson Hicks (Hiks), ministro de internaj aferoj, malhelpi min, — persone saluti vin. Se li opinius ke li povus konstruigi muron ĥinan ĉirkaŭe de la okcidentaj limoj de ĉiu lando, la efiko estus centobla plifortigo de la internacia solidareco de la proletaro". Li plue diris, ke antaŭ kelkaj minutoj ĵurnalisto demandis lin, ĉu li veturis ĉi tien per aerŝipo. Responde, li sciigis la ĵurnaliston konfidencie, ke antaŭ jaroj la Komunista Internacio ekkonstruigis tunelon sub la "Angla Kanalo" (La Manche). Sekvis ridado kaj forta aklamado. Fine k-do Stoecker diris: "Se la Brita registaro opinius, ke per tiaj bagatelemaj rimedoj oni povus malhelpi la revolucion, do ties membroj estas infanecaj kaj absurdaj".

Post kiam ili faris siajn paroladojn, k-dino Lebel kaj k-do Stoecker forlasis la kunvenejon kaj denove trompis la policanojn. Pro tiu ĉi okazaĵo kompreneble la estraro de la lastnomitaj tre okupiĝis por ke ili kontentige klarigu la ŝajnan malatenton de siaj kunlaborantoj. Rezulte, la venontan tagon ili konstatis, ke post zorgaj esploroj ili tute konvinkiĝas ke tiu, kiu paroladis dum la kongreso en Glasgow, tute ne estas Stoecker de la Germana Reichstag! Aliflanke, oficistoj de la Brita kompartio forte neas la sugeston, ke Stoecker mem ne ĉeestis, sed ke iu alia lin personigis. Ekzistas nenia dubo pri lia aŭtentikeco. La policanaro estu certa pri tio, ke ili nepre estas trompitaj tiun ĉi fojon.

Kiel konfirmo de la supredirito la heroo mem de la afero, enirante la oficejon de "Daily Herald", tuj dispelis ĉiajn dubojn pri sia identigo. "Vi certe volas kontentiĝi, ke mi vere estas mi mem", li ekdiris, "do jen mia fervoja rajtigilo, kiel membro de Reichstag, kune kun mia fotografaĵo kaj subskribo oficiale afrankitaj". Tamen tia evidenteco estis tute nenecesa. Troviĝis tie du anoj de la "Daily Herald" — oficistaro, kiuj antaŭe vidis Stoecker, kaj en Berlin kaj kiam li vizitis nin lastan jaron, tute laŭleĝe, kiel delegito de la "Neniam plu Milito" konferenco.

Pro diversaj kialoj li kompreneble ne povis viziti la ministron de internaj aferoj, sed samtempe li sentis, ke li volas adiaŭi lin: li do pere de "Daily Herald" deziris sendi al li "proklamon": t. e. li volas, ke ĉiuj sciiĝu, ke li vere vizitis tiun ĉi landon, ke kompreneble la Glasgow' a policanaro tre koleriĝas pri la maniero, en kiu li ilin trompis kaj evitis, kaj pro tio ili penas kaŝi sian stultecon per granda mensogo. Tia faraĵo estas des pli rimarkinda, ke nur lastan someron li faris paroladon en la sama urbo, kaj tial la policanoj tie bone konas lin.

La gazetaro ankaŭ trompiĝis pro la rakonto de personigo, sed ĉiufoje la kulpo estas ĉe la policanaro.

Plue venas trompaj rakontoj el Germanio. La korespondanto de la angla ĵurnalo "Westminster Gazette" en Berlin telegrafis al sia ĵurnalredaktoro, ke Stoecker sciigis al li, ke li ne forlasis sian hejmon ĉe Nikolas-See post sabato. Al kiu Stoecker faris respondon, ke ties korespondanto ankaŭ trompiĝas ĉar li loĝas en Wilmersdorf, ne ĉe Nikolas-See.

Responde al pluaj demandoj pri la maniero, kiel li forlasis la kunvenejon en Glasgow, kaj pri sia reveno al Germanio, li diris: "Mi simple elvenis, kaj la policanoj tiom deziregis eniri, kiam la pordo malfermiĝis, ke ili tute forgesis rimarki tiun, kiu elvenis!"

---

1) Internacia proverbo.

# Kiel brita imperiismo subpremis Ĉinion

**Cent jaroj da alilanda atakado**

1820—1830. Brita Orient-hinda Kompanio rabis pli ol £ 1500000 dum jaro, per importado de opio al Ĉinio, spite la ripetitaj protestoj de la Ĉina Registaro.

1839. Ĉina Registaro sendis al Kanton delegiton, kiu konfiskis k. subigis maren 20000 kestojn da opio.

1840—1842. Britio deklaris militon kontraŭ Ĉinio, k. venkinte, igis ĝin pagi la kostojn de la milito k. akiris "lukontrakton" por Hong-Kong, nun la plej granda haveno en Ĉinio. La demando pri opio ne enestis la Packontrakton.

1830—1864. Terkulturista Ribelo en Ĉinio kontraŭ la Imperiestro, kiu estis en manoj de la britoj. Ribelo nomita "Taiping-Ribelo", finfine subpremita de Generalo Gordon.

1856. Ĉinoj ekprenis britan ŝipon ŝarĝitan de opio. Britio deklaris militon, kiu daŭris intermite ĝis 1860. Kiel rezulto de tiu milito:

I. Importado de opio en Ĉinion estis laŭleĝigata.

II. Britio ricevis teritorion sur la kontinenta tero kontraŭ Hong-Kong.

III. Tiencin estis deklarata libera haveno, t. e. ne sub regado de Ĉinaj Doganoj.

IV. Doganoj transmetitaj sub alilanda regado.

V. Specialaj tarifoj starigitaj por fremdaj komercistoj.

1860—1900. Ĉinio perdis kelkajn teritoriojn, per "lukontrakto", "koncesioj" aŭ tutplena rabo, al ĉiuj la grandaj potencoj — Birmo, Anamo, Tonkin, Koreo, Formoso, Kiao-Ĉaŭ, Port Artur, Vaj-Haj-Vaj, cet., krom ĉiaj specialaj privilegioj rilate minaĵojn, doganojn k. t. p.

1900—1901. Dua Terkulturista Ribelo kontraŭ la fremdaj imperialistoj (ta t. n. "Bokser-Ribelo") estis subpremata de internacia militistaro. Oni perforte postulis ke Ĉinio pagu £ 60000000, enlasu fremdan militistaron en Pekin'on, k. t. p.

1910. Japanio ekprenis Orientan Mongolion.

1914. Japanio deprenis Ŝantung de Germanio.

Trad. el "The Sunday Worker"

*E. K. L.*

Al la dua demando li respondis: "Mi revenos sammaniere, kiel mi veturis ĉi tien, per la "Kanal-Tunelo". Adiaŭ, kaj mi petas doni adiaŭon al la kavaliro Joynson Hicks pere de via ĵurnalo!"

Sed eble la plej amuza kaj distinga okazintaĵo rilate al la tuta afero estis, unu tagon, post la oficiala kongreso, privata kunveno de komunistinoj. Dum ili kunvenis, granda aro da policanoj kaj detektivoj eniris en la halon kaj postulis nomon kaj adreson de-ĉiu delegitino. Iu komitatano konsilis ke ili ne faru tion. Ĉar ili tute rifuzis, la policanoj faris alian provon. Ili petis, ke ĉiu virino parolu. Estas nenecese rimarkigi, ke la virinoj ĉiam estas tre elpensemaj! Leviĝante, kiel aro, ili konsentis kaj kantis la "Internacion"! Poste ili kriegis kune en la skota lingvo. Kaj por plue daŭrigi la ŝercon kaj mistifiki la policanaron, 11-jara knabino, filino de iu komunista estro, parolis ruse, kaj virino faris paroladeton la la policanoj Esperante! Neniu estis arestita, kaj tiel la afero finiĝis. Sed kia bruo pro du eksterlandaj ruĝuloj!

La moralinstruo estas sufiĉe klara!

*Ofiro*

# Sciigoj el Oriento

1. El Moskvo tra Mongolio en Ĉinion ekflugis aeroplanoj de sovetia Aviosocieto 10an de junio. Partoprenis ĵurnalistoj kaj kinematografistoj. La aervojo longas 7000 kilometrojn kaj transiras faman mezazian dezerton Gobi. La entrepreno celas ekzameni rusajn nemilitajn aeroplanojn kaj simbolas interligon de Sovetio kun Oriento.

2. Anglo-amerika kompanio Lena-Goldfils ricevas rajton ekspluati siberiajn ortrovejojn lokitajn ĉe rivero Lena en regiono de Bodajbo dum 30 jaroj. La kondiĉoj:

1) obei prilaborajn leĝojn de Sovetio;
2) la laboroj devas esti maŝine aranĝitaj kaj post 30 jaroj sendifekte transdonitaj en posedon de Sovetio;
3) la kompanio devas liveri al Sovetio kelkprocentojn de l' profito, minimume ne malpli ol 2000000 rublojn pojare.
4) La kompanio por maŝine instali la ortrovejojn devas meti ne malpli ol 20000000 rublojn. Reprezentanto de l' kompanio *Hedalla* skribis en gazetoj, ke ne Sovetregistaro invitis la kompanion por ekspluati orejojn de Lena' kaj ke la kompanio ne bezonas admonavertojn de tiuj Sovetkontraŭuloj, kiuj tute ne konas la situacion.

3. En Manĝurio okazis konflikto inter ĉina registaro kaj estro de soveta fervojoficejo. Ĉinoj ne volas eksigi el la oficejo rusajn blankulojn. Karaĥan oficiale protestas konduton de ĉina estraro protektanta rusajn reakciulojn.

4. En Ŝanĥaj 30an de majo okazis grandioza kontraŭjapana stratprotesto, organizita de ĉinaj studantoj kaj partio "Gomindan". Anglaj policanoj pafis la protestantojn. Estas mortpafitaj 6 homoj. 120 studantoj estas arestitaj.

*Maksim Krjukov.*

# El Sovetio

1. Duan jaron jam ekzistas en Sovetio Aviosocieto de volontuloj. Ĝi havas nun tra tuta Unio 29868 ĉelojn kun 2400000 anoj (el ili laboristoj 48 %, vilaĝanoj 16 %). Ili ensume kolektis ĉirkaŭ 5000000 rublojn (2500000 dolarojn). El ĉi sumo por konstrui aeroplanojn estas elspezitaj ĉirkaŭ 3300000 rubloj. La societo, prezidata de Kamenev, en fino de majo organizis sian tutunian konferencon kaj decidis pli atenti aranĝadon de aerlinioj precipe en vasta kaj senvoja Azio. Oni aranĝas aerlinion inter Irkutsk kaj Jakutsk en ekstrema Siberio. Dum pasinta jaro aeroplanoj de l' societo kovris entute 252328 kilometrojn, transveturigis 5663 homojn kaj 7572 kilogramojn da pezaĵo. Aeroplanoj de l' societo, dum ĝi ekzistas, havis nek unu akcidenton. La societo havas ĉiujn ŝancojn por progresi.

2. Radiistoj de Sovetio festis tridekjaran datrevenon de radiotelegrafo, kies modelo estis unuafoje demontrita 7an de majo 1895 en Leningrad de profesoro Aleksandro Popov. Aparato de Popov somere 1895 bone notis atmosferajn ekfulmojn, kiuj okazis en distancoj de 20—30 kilometroj. Radiolaboroj de fama Markoni aperis nur en sekvanta 1896 jaro. Popov estis direktoro de leningrada elektroteknika instituto kaj mortis 31. dec. 1905 post akra konflikto kun tiama cara estro de ĉefurbo pro tiamaj studentaj protestoj politikaj. Eĉ profesoroj malpacis kun reakcio dum cara reĝimo!

3. Kaŭkazo estas naftoza lando. La plej konataj naftejoj lokiĝas en regionoj de Baku, Gróznij (meze de Norda Kaŭkazo) kaj Embá (en norda ekstremo de Kaspia maro). Per montri progreson de naftindustrio mi citas jenajn oficialajn statistikojn: dum aprilo de nuna jaro Baku liveris 385000000 kg da nafto (pli ol dum marto je 6100000 kg). Dum la sama aprilo Groznij liveris 180100000 kg kaj Embá 18000000 kg (je 2400000 pli ol dum najbara marto).

Kruda nafto estas distilata por liveri lampoleon aŭ tiel nomatan petrolon (ruse *kerosin*). Inter Kaspia kaj Nigra maroj ekzistas petrolkondukilo kiu funkcias simile al akvokondukilo. La kondukiloj longas pli ol 1000 km kaj pumpis dum aprilo 165000000 da kg da petrolo. La nafto ĝis nun estas transportata per ŝipoj kaj fervojoj. Sed ĉi transporto estas tre maloportuna kaj kara. Tial Sovetregistaro planas aranĝi novajn naftokondukilojn inter Baku kaj Nigra maro (1000 km) kaj inter Groznij kaj havenoj Tuapse' aŭ Poti' de l' sama Nigra maro (ĉirkaŭ 700 km). En 1913 jaro estas eksportitaj eksterlanden 950000000 kg. En nuna jaro la eksporto devas atingi 1393000000 kg. Vi vidas, ke naftoindustrio estrata de laboristoj bone progresas. Naftoproduktado estas elektrigata, Baku rapide kreskas: en 1860 ĝi havis nur 13830 loĝantojn, en 1890 ĉirkaŭ 100000, en 1913 pli ol 250000, nun — ĉirkaŭ 300000. La urbo havas bonajn tramvojojn kaj akvokondukilon, kiu sifone liveras akvon el montoj lokiĝantaj 100 km de Baku.

*M. Krjukov.*

# TRA LA KLASBATALO

La striko en Ŝanĥaj pliakrigite daŭras.

En Paris la ĉinaj studentoj demonstraciis kontraŭ la ĉina ambasadoro.

La strikmovado en la minoj kaj metalejoj de l' industridistrikto Charleroi (Belgio) estas ĝenerala.

Laŭ sciigo de l' regna nutrad-ministerio la prezoj por nutraĵoj estas plialtiĝontaj en Germanio.

En la germana regna parlamento komenciĝis batalo kontraŭ la uzuraj dogantarifoj intencataj de la german-nacia registaro.

## Persekutadoj de litovaj socialistoj

En Mariampolo okazis juĝo kontraŭ ses rev. kolegoj pro demonstracio kontraŭ milito en aŭtuno 1924. Baldaŭ estos alia juĝo, pro grenadoj, kiujn provokisto deponis sur stalo.

La organo de la lernant-organizaĵo "Aŭŝryne", maja numero, — estas konfiskita. Same la organo de laborista junula organizaĵo "Jaunuju draugas".

La sola taŭga en Litovio "Real-gimnazio", vivanta ĉefe el helpoj, plejparte de litovaj elmigrintoj en Ameriko, — nun likvidiĝos pro interveno de ministra kabineto.

Jam persekutoj eĉ direktiĝas kontraŭ malorganizitaj evoluciuloj anarkistaj pro la ideoj.

*Aldona*

# Stranga "amnestio"

Jam kelke da tempo la germana registaro okupas ŝin pri la amnestio promesita, kiel rekompenco por la elekto de Hindenburg. Tiu ĉi amnestidemando ŝajne al ili kaŭzis sufiĉajn kapdolorojn, meditante, ke oni ĝin verku tiel, ke kiom eble plej malmulte da laboristoj estu amnestotaj. Ĝis nun flanke de la regnaj oficejoj aŭdiĝis nenio pri ĉi tiu afero, ili silentadas. Tiu silento pli multe diras al ni, ol se oni donus cent dekretojn. Sed diversaj famoj cirkulas tra Germanio el kiuj kelkaj eĉ estas tute precizaj.

Laŭ ĉi tiuj famoj la dumsemajnajn traktadojn inter la diversaj landoj pri la amnestio tutregna oni ĉesigis, ĉefe konsiderinte la opinion de Bavario (la faŝista centro).

Intencata la "amnestio" prezentiĝas jenamaniere:

La krimoj faritaj post la 1. Oktobro 1923 ne estos amnestataj.

Kondamnoj je pundomo ne estos amnestataj.

Plue ĝi nur rilatas al tiuj, kiuj estas kondamnitaj de la *regnaj juĝejoj.*

Do, kiuj laŭ ĉi tiu plano estos reliberigitaj?

Kelkaj laboristoj kaj *ĉiuj* faŝistoj.

Oni ne amnestos Max Hölz, ĉar li estas "pundomulo".

La mortigistoj de Rathenaŭ estos reliberigitaj, kaj la mortigistoj de Erzberger revenos Germanion.

Oni ne amnestos la laboristojn kiuj post la bataloj dum marto 1921 estis kondamnitaj de la eksterordinaraj juĝejoj, ĉar ankaŭ ili estas plejgrandparte "pundomuloj" kaj "aĉaj krimuloj".

Ankaŭ la laboristoj, kiuj dum oktobro 1923 batalis en Hamburg, restas malliberaj, ĉar iliaj krimoj okazis post la 1. oktobro 1923.

Ĉu tio estas amnestio? Certe ne! Tio estas laŭ politikaj vidpunktoj ellaborita monstro, konvena al la Hindenburg-respubliko. La laboristoj plu povas "ĝui" malliberejan aeron, kaj la faŝistoj estos reliberigitaj, por ke ili daŭrigu sian laboron, restarigi la monarkion kaj perforte malebligi ĉian ajn laboristan movadon.

Kontraŭ tiu amnesti-monstraĵo en regna parlamento protestoj nenion utilas. Tiu skandalo denove montras, kiom ree impertinentiĝis fikapitalistaro depost 1918 dank' al la toleremo de la laboristoj. *Voko*

## FEMINISMO

Sub tiu nomo sin trovas la celo, la postularo de l' homa ino.

Kia ĝi estas, aŭ kia ĝi devas esti? Ĉar la Homo konsistas el du elementoj, nome ino kaj viro kiuj formas nedisigeblan tuton, oni povas prave diri, ke tiu celo devas esti komuna al ambaŭ; sed, ĉar inoj korpe kaj instinkte, kaj sekve ankaŭ je bezonoj diferencas de la viroj, oni povas ankaŭ ne malpli prave diri, ke tiu celo ne devas esti al ambaŭ komuna. Ĉu do la viroj sin miksu je ina problemo kaj reciproke, la inoj je la vira?

Estas du ebloj kaj unu devo: 1a) Inoj kunlaboras aparte de la viroj por kontentigo de siaj specifaj bezonoj, kaj viroj ankaŭ por siaj, aparte de la inoj.

2a) Viroj kaj inoj reciproke kunlaboras. *Devo:* Ekstere de siaj specifaj aferoj, ambaŭ ne nur povas, sed devas ĉiam kunlabori reciproke.

Juste, do, — se oni ŝatas liberecon — feminismo rajtas ekzisti.

Ni supre diris, ke la Homo estas unu, sed duelementa. Sekve, por rapide, bonsence kaj trafe progresi al konkiro de l' idealo (forigo de kiel eble plej multe da doloro) estas necese ke ambaŭ elementoj kuniru, kiel kuniras la gamboj de unu sama korpo.

. . . Progresi rapide, bonsence kaj trafe? — Jen la kerno de l' demando.

Unu el la difektoj de l' homa fakulto estas la ĝeneraligado. Oni pri tutajo havas tian opinion, kian oni ricevis de unu el ĝiaj eroj, ekzemple: Lerte parolantan homon oni juĝas inteligenta, kaj povas esti ke sur ties ŝultroj staras eminenta kukurbo! Se iu (ne franco) enveninta Francion renkontas en laborejo patriotojn, kiuj fine elpelas lin, li, reveninte sian landon, diros akre "ĉiuj francoj estas patriotoj!"

Kiu do ne aŭdis, ke *ĉiuj* anarkistoj estas dinamitemaj, ke *ĉiuj* komunistoj, diktatoremaj, ke *ĉiuj* germanoj, militemaj aŭ ke *ĉiuj* judoj, fikomercemaj?

Laŭ unu el ĝiaj eroj oni erare juĝas la er-aron!

Kaj la ĝisnunan feminismon ankaŭ. Ĝi estas reago, ondo de venĝo kaj envio. Oni rezonis tiel: Viroj regas, ordonas; viroj instruas, kuracas . . . kial ni, inoj de l' sama speco — sekve samrajtaj — ne faru ti-kion ili faras?

Kaj baldaŭ aperis sur stratoj kaj bulvardoj, iaj feministinoj, kiuj "kun cigaredo en buŝo" okaze eniras drinkejon trinki pokaleton da delikate mortiga likvoro.

"Ni volas voĉdoni kaj esti elekteblaj, ankaŭ ni rajtas ordoni kaj regi!" 1)

Ke la viroj progresis unusence ne signifas, ke aliasence ili ne malprogresis. Progreso kaj malprogreso iras kune kaj ambaŭ konfuziĝas paradokse: ju pli progresas la konsumado de alkoholo, despli progresas la nombro da krimoj kaj frenezuloj. Ĉi-tiuj du progresoj formas parton de l' Socia Malprogreso.

Ne, la tasko feministina ne estu blinda imitado; ĝi estu leciono de justeco kaj saĝeco se ĝi volas trovi eĥon ĉe l' moderna horizonto.

Anstataŭ diri: "Ni volas regi!" feministinoj diru "For la registojn ambaŭseksajn!" Anstataŭ fumi kaj trinki, ili instruu la virojn pri l' mortefikoj de tiaj venenoj. Anstataŭ pudri al si la vizaĝon, anstataŭ sin maski kvazaŭ dum idiota karnavalo, ili studu fiziologion kaj gimnastikon, kiuj havigas nekompareble pli da beleco kaj saneco ol ĉia "scienca" produkto industria.

Ili imitu la bonon de la viroj kaj imitigu la sian al ili. Tiel, unu elemento kompletigos la alian kaj pro ilia kompleteco estos eble *progresi rapide;* rifuzante ĉian malvirton ili devos *progresi bonsence,* kaj konstanteco en bonsenco igos *trafe progresi.* Kaj tiam, la kerno de l' demando estos rompita.2) *Guma.*

## KORESPONDEJO

*5189.* Via trad. aperos. Ne anoncis sin korespondemuloj el Oriento.

*2364.* Via art. aperos en venonta numero.

*3380.* Via artik. aperos baldaŭ. Bildojn pro multkosteco ni verŝajne ne uzos.

*Rim.* Ondo de materialo malebligas al ni aperigi ĉiujn senditajn art. en "plej proksima numero" (kiel postulas multaj). Ne tro urĝan materialon ni tial prokrastas pro neceso. *Red.*

---

1) Ekzistas en Francio feministina asocio, kies presorgano estas titolita "La Francino". Kion pensi pri tiaj patriotaĉismoj?
Ve al Fuŝa Progreso!!

2) Ĉiuj kamaradinoj, kiuj interesiĝas pri Feminismo, laŭ la racia direkto ĉi-supre skizita, sin turnu esperante al "*Racial Fémina Club*".
Margareto Estour. sekretariino.
1 bis. str. des Coutures-Saint-Gervais, Paris III.

# El la Vivo kaj Scienco

## La "Semajno de l' infano" en Portugalio

Dank' al penoj de l' Asocio de l' Profesoroj de Portugalio, okazis dum kelkaj tagoj de la pasinta monato sekvo da festoj dediĉitaj al infanaro de l' lernejoj, en Lisbono kaj en aliaj urboj. Malgraŭ la oficiala helpo al tiu ĉi interesa "Semajno", kiu celis alvoki la atenton de l' aĝularo pri la defendo, la edukado, la socia vivo de l' infanoj, ĝi limiĝis al ĉefaj urboj kaj la komemoro1), kelkfoje, estis — tro malfeliĉa. Ni citu ekzemple, ke la komenco de l' "Semajno" en suda urbo fariĝis — per diservo.

Kulpaj evidente ne estas la iniciatintoj, inter kiuj troviĝis la eminenta prof. Faria de Vasconcelos; ilia celo estis ja vere homa, ĉar oni volis per la "Semajno" krei en aĝularo ideon pri sia respondeco antaŭ la infanaj vivo kaj rajtoj kaj en infanaro konscion pri propra persono. Sed, la plimulto ne komprenis tiajn intencojn, tiel kiel ili komprenas nenion, ĉar la profesoroj — feliĉe oni trovas esceptojn! — nur pensas pri la neceso ricevi la salajron kaj atente dorloti la riĉajn infanojn, forgesante la malriĉajn aŭ memorante pri ili, kiam, laŭ ili, necesas ilin bati!

La "Semajno" estas okazinta. Oni komencas nun pridiskuti ĝin. Ni esperu, ke la mallertaĵoj de l' unua komemoro estu forigataj. Ĉar estas urĝe necesa la daŭrigo kaj la kreo de konscio inter la infanaro, kiu, laŭ la modernaj pedagogoj, — ni citu ekz., d-ron Adolfo Lima — devas estri sian ekziston.

*Forlasu la patrojn, prizorgu la filojn!*

*José Antunes.*

## La plej granda ponto de la mondo

La Ora Pordego, pro sia pejzaĝa beleco glorinda marbrako, kiu ligas la Pacifikan Oceanon kun la golfeto de San Francisko, estas granda malhelpaĵo por la interrilato inter San Francisko kaj kontraŭkuŝanta ĝin duoninsulo, kaj jam delonge oni prilaboras projekton, transpontigi la marbrakon. Certe, ĝia larĝo estas 2500 m, kaj ĝis nun mankis uzebla projekto por ĉi tiu potenca ponto, kiu estus necesa tie.

Nun alportis J. B. Strauss, konata pontinĝeniero, projekton, por konstrui ponton super la Ora Pordego, kiu, se oni konstruus ĝin malgraŭ la granda kosto de 17 milionoj da dolaroj, superus ĉiujn estantajn pontojn je kuraĝeco de konstruo kaj je potenco de proporcioj.

La tutlongo de l' ponto laŭ la projekto de Strauss estas 2574 m, la pendanta mezparto de l' ponto estas longa 1200 m. Tiu ĉi mezparto superas je la dudekoblo la ĝis nun plej longan ponton de la mondo, kiu kondukas super Laŭrenca rivero ĉe Montrealo (Kanado). La ponto estas konstruata kiel penda ponto, kaj la mezparto pendas je du fortegaj metalŝnuroj

---

1) Komuna memoro.

po 1600 m ĉe la potencaj ŝnurparoj. La metalŝnuregoj pezas proksimume 5250 t. La veturvojo atingas laŭ la projekto 24 m larĝon, ne kunkalkulante la duflankajn trotuarojn. La alto de l' libera traveturejo, sub la ponto, estas 60 m kaj la du el ŝtalo konstruotaj turparoj 233 m super la nivelo, do nur malmultajn metrojn sub la plej alta turdomego Novjorka. Kune kun la fundamento preskaŭ ĉiuj el la turparoj atingas la alton de l' Eifelturo.

Ducent tridek metrojn super la nivelo oni konstruos en la turoj galeriojn, kiuj estos atingeblaj por la popolo per liftoj, por ĝui de tie la bonegan nepriskribeblan perspektivon, super la domarego, oceano kaj tiu ĉi de altaj montoj ĉirkaŭbarita golfeto de *San Francisko.*

Espereble la tempo ne plu estos malproksima, kiam la lumĵetiloj, kiuj estas sur la plej altaj pintoj de l' turoj konstruotaj, salutos la ŝipojn kaj kondukos en malluma nokto en la Oran Pordegon.

(Kaj espereble mem la proletaro, konstruonta tiun gigantaĵon, ekposedos ĝin por la popolara utilo kaj ne lasos ĝin al misuzo flanke de profitemaj imperialistaj rabistoj. — *Red.*)

Laŭ "La ŝtono de l' saĝuloj" elgermanigis M. Diesler.
(3028)

# „Alvenu tuta sportular', el ĉiu part' de l' mond'!"

Tiel ĉi-jare Laborista Sportintern alvokas siajn membrojn por kunigi ilin al mond-sport-renkontiĝo. De 24.—28. julio okazos en Frankfurt apud Main la "I. Internacia Olimpio Laborista." Amikoj el 20 nacioj alrapidas por en paca konkuro mezuri povon kaj forton. Tamen ne nur sporto estas, kiu kunigas ilin, sed profunda Interna sopiro al popol-interkompreniĝo kaj — interpaciĝo, kiu ĉiujn instigas. Vere okazo de mondskuanta graveco. Ĉiuj preparoj estas farataj por garantii plenan sukceson de la aranĝo. Sed malhela nubo malklarigas la altegajn atendojn. La lingvaj diferencoj de la civilizita mondo. Moderna *Babelo* nin atendas. Kvankam la esperantistoj klopodos malgravigi laŭpove ĉi-malbonon, tamen grandaj masoj de festpartoprenantoj restos fremdaj unuj al la aliaj, disigataj per lingvaj baroj. Pli ol iam, homo en tia situo sentas la bezonon de internacia lingvo. Neniam li estas pli akceptema por la propagando de komuna lingvo ol en tia okazo. Ĉu esperantistoj volas malatenti tion? Ne! Ĉiuj preparoj estas farataj por vigla varbado por nia afero. Sed maniero kaj amaso de la disdonotaj varbiloj direktiĝas laŭ la monrimedoj disponotaj al ni. Ili vere ne estas abundaj. Pro tio ni al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, — grupoj kaj -anoj direktas la peton: donu obolon por la propagando de Esperanto dum la I. Olimpio. Eĉ la plej malgranda donaco helpos al nia afero. Diris jam nia kara majstro: Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan. Niaj "mifrati" certe ne ŝparos, subvenciataj de Ĉokoladfabriko. Do ni faru nian devon. Ĉiujn monsendaĵojn oni direktu al k-do

*Ad. Wendt,*
*Leipzig-Stö., Lange Reihe 11a. (Germanio)*

aŭ al la administrejoj de LEA kaj SAT, sed surskribu por: *Olimpio Propagando.*

Mondonacojn ricevitajn kaj ricevotajn ni kvitancos en "Laborista Sporto".

# Publika letero

*(Kiun presigi petis nin la subskribintaj vilaĝanoj - Red.*[1]*).*

Kamaradoj, kamparanoj de Bulgario!

En la tago de Internacia Solidareco, la unua de majo, ni gekamparanoj de vil. Ŝkarovka (Sovet-Unio) sendas al vi niajn plej bonajn dezirojn. Ni jam fintoleris ĉiujn pezojn de l' Sociala revolucio kaj atingis la ĉefan celon: ni jam ne havas perfortulojn — ekspluatantojn. Male, ni havas nian laborist-kamparanan potencon, kaj ni staras sur la vojo al Hela Regno de Komunismo.

Vi ankaŭ penige batalas kontraŭ viaj centjaraj premegantoj. Ne perdu la kuraĝon en tiu peniga batalo, vi ne forgesu, ke ni ĉiam memoras pri vi, kaj en la decida momento ni estos kun vi.

Prezidanto de l' kunveno, Prezidanto de Vilaĝsoveto Nikonenko.

Prezidanto de vilaĝa Komitato de malriĉuloj I. Ŝelest.

Sekretario de vilaĝa Komjunularo Petrenko.

# RADIO

*La Germana "Funk"-Kartelo kaj la radiohelplingvo*

La Germana "Funk"-Kartelo estis decidinta dum decembro 1924 laŭ iniciato de Germana Ido-Radio-Klubo, investi ekzamen-komitaton por studi la temon "internacia radio-lingvo".

D-ro E. Jäger, Leipzig, gvidanto de Leipziga forsendejo, estis komisiita, prilabori ĉi-taskon.

Antaŭ ne longa tempo en Frankfurt a. M. okazis provizora diskutado, en kiu partoprenis po 2 reprezentantoj de la mondhelplingvoj Esperanto kaj Ido.

Oni interkonsentiĝis principe, ke necesas enkonduki internacian helplingvon por radiotelefonado, sed ke ĉi-lingvo ne forigu la germanan.

Ĝi estu limigata nur je tiaj komunikoj, kiuj rilatas precipe internacian intereson. — Pri tio, ĉu Esperanto aŭ Ido estu elektota, la diskutado ne jam estis decidinta.

Trad. el M. N. N., München, *1804.*


# L A S T H O R E

**Unua Olimpiado Laborista Internacia**
**24.—28. julio 1925 Frankfurt-Main**

En la kadro de la olimpiado internacia ankaŭ estos aranĝata oficiala Esperanto-Ekspozicio. Flanke de laboristaj asocioj estos reprezentataj:

Esperanta, atleta, bicikla, anti-alkohola, naturamika, higien-mastrumada, sanec-flegado, liberpensula, gimnastika, ŝaka k. sanitarista k. a.

*Ĉu vi posedas esperantan materialon indan por ekspozi?*

Sendu tuj liston, ke oni evitu duoblajn anoncojn (ĝis 3. julio).

Ĉiu sendanto ricevos signon! Ekspoziciajn elspezojn vi ne havos.

*Kunhelpu, por fari interesplena la ekspozicion!*

Adreso: *Karl Naber,* Eckenheimerlandstr. 97, *Frankfurt-Main I.*


[1] prokraste alveninta.

# *Inter ni*

*Troviĝas en iu urbo laboristaj esperantistoj. Deziras ili esperanton propagandi kaj instruadi. Tiucela grupiĝo okazas. Por propagandi bezonas la grupo propagandilojn; por instruadi, instruilojn. Sed proprafορte ne povas la grupo eldoni la necesajn ilojn. Kuniĝo de fortoj montriĝas necesa. Naskiĝas nacilingva por-esperanta organizaĵo.*

*Sed baldaŭ la sperto montras, ke tute nesufiĉa estas la por-esperanta varbado. Kiam la lernantoj finis kurson necesas ilin reteni kaj ligi al la esperanta movado. Aliel preskaŭ vana estus la farita laboro. Tion pruvas la granda nombro da personoj lernintaj esperanton kaj kiuj tamen neniom profitas je sia lernakiraĵo kaj neniom helpas la antaŭeniron de nia afero.*

*Por ligi la ellernintojn al la movado ne ekzistas pli bona rimedo ol instigi ilin al tuja aplikado de la lingvo. Estas evidente, ke oni ne lernas esperanton por interparoli kun siaj gepatraj samlingvanoj. Necesas transpaŝi la landlimojn. Necesas iel ajn interrilati kun eksterlandanoj. Necesas gazeto esperantlingva, literaturo, adresaro. Unuvorte necesas aparato, ebliganta la praktikan utiligadon de la lingvo.*

*Tial naskiĝis SAT.*

*Ĉu taŭga ĝi estas? Faktoj respondu: SAT naskis du presorganojn: semajnan kaj monatan; ĝi jam pliriĉigis nian literaturon je kelkaj valoraj verkoj; ĝi eldonas ĉiujare Jarlibron kun adresaro de la membroj; ĝi jam faris multajn servojn, kies tutcito ne estas necesa por pravigi la tezon.*

*Do, ekzistas la bezonata aparato kaj funkcias. Ne tiom amplekse kiom dezirinde, sed pri tio responda ne estas la aparato mem, sed ties uzantoj kaj ĉefe kiuj ne volas ĝin uzi.*

*Sed pekhava estas la SAT-aparato: ĝi sisteme penas ignori la nacilingvajn poresperantajn asociojn. Granda la peko. Nepardonebla eraro. Nerespektema sinteno. Ĉu do la sindikatoj, la kooperativoj, la politikaj partioj ne estas internacie kunligitaj? Kial la esperantistoj ne imitus?*

*Ja efektive, kial? Kial aeroplanoj flugas en la aero, dum aŭtomobiloj ruliĝas surtere? Esperantistoj tutmondaj samlingvanoj estas, ili ne devas simie apliki la organizsistemon de nesamlingvanoj.*

*— Vi ne konvinkos nin. Fondu ni esperantistan internacion. Ni ja povas trudi al aeroplanoj, ke ili sekvu serpentumajn vojojn surterajn.*

*Tiele parolas rutinemuloj. Vivu tradicio, rutino kaj ĉia samspeca sanktaĵo. La organizsistemo de SAT estas ja malbona; ĝi estas diable sataneca.*

*For! . . . for! . . .* Eŭtrapel.


**"Esperantista Laboristo"**

1a jaro n-oj 1, 2, 3, 4, 7, 8, 9 aŭ tuta 1a jarkolekto (lasta n-ro oktobro 1920) aĉetas:

**Rob. E. Bitzer, München, Germanio**
Hesseloher Strasse 11/2

# DISKUTEJO

## Gardu organizecon!

Mi deziras aldoni kelkajn vortojn al mia artikoleto aperinta en n-o 34 de "S-ulo" kaj erarpresita kun subskribo "Nik. Jefimoviĉ" (ĉar ĝi estas mia nomo kaj patra nomo), pri diskutinda lingvodemando. Ĉi-tiun demandon "S-ulo" devas starigi sur seriozbazon, parte por deflankigi eblan plimalmultigon de abonoj, ĉar mi antaŭdivenas ke petolanta "progreso" havas sufiĉe multajn malkontentulojn, sed plej grave estas, ke "S-ulo"-organo de SAT, kaj SAT estas kondukanto de revolucitendencoj kaj organizanto de revoluciema laboristaro, kaj Esperanto estas peranto per kiu SAT povas revolucie influi laboristaron. Sed tiu peranto nepre devas esti ne ŝanĝata, sen ĉiaj progresemaj deflankiĝoj, ĉar tio nur donos embarasiĝon kaj malsimpligon. "S-ulo" devas doni sur siaj paĝoj lokon por diskuto de lingvodemando. K-doj devas klarigi tiun-ĉi demandon: 1) Ĉu estas necese evoluigi Esperanton? 2) Se evoluo ("progreso"), laŭ plimulto, estas necesa, kiel solvi tiun taskon, ĉu iri laŭ vojo proponata de Idoamikoj k-doj Izgur, Avrunin, Kolĉinski kaj Frejdberg (rigardu artik. en "S-ulo" n-o 34 "Helpu la progreson!"), paŝo post paŝo sisteme rabi lingvon Ido kaj formigi "linguo internaciona di la progresistoi Miesperanto, miido", aŭ estos aliaj proponoj? 3) Ĉu tiuj progres-operacioj estos faritaj unufoje, t. e. estos farita unika nova fundamento de internacia lingvo, aŭ kompatinda paciento senĉese devas suferi kaj toleri senfinajn operaciojn, ĝis kiam la malicaj kaj senkompataj operaciistoj-progresistoj fortranĉados kaj disĵetados la lastajn pecetojn de Esperanto? Mi kredas, ke eble tiam ili estos kontentigitaj kaj trankviligitaj. La riĉa kaj fleksebla lingvo Esperanto ne bezonas progres-operaciojn. Progresigo de Esperanto estas afero tute senutila, ĉar ĝis tiu-ĉi tempo Esperanto kun sukceso plenumas sian taskon; progresado povas nur fari disiĝon en vicoj de esperantistoj-laboristoj. Oni povas ĝui bildon: ekz. esperantisto de lingvoepoko de 1925 jaro tute ne ekkonos "progresigitan" Esperanton de epoko 1926—27 jaro, ĉar tiam Esp-o, kiel ĥameleono ŝanĝados dum ĉiu jaro, monato, tago . . . La riĉa "ĝisreforma" esp-a literaturo estos nuligita, oni povas uzi ĝin por enpaki haringon kaj buteron. Evoluoperacioj alportos pli da malbono, ol da bono. Sendube — senĉesa progresigado estas glitiga kaj tre danĝera vojo. Ĉi-tiun lingvodemandon ni devas solvi por ĉiam kaj definitive per personaj enketoj de ĉiuj SAT-anoj, SAT-emuloj kaj abonantoj de "S-ulo", alivorte ni devas aŭskulti voĉon de socio. SAT devas preni tiun taskon kaj enpresi en "S-ulo" rezultatojn de enketbaloto. Mi instigas, k-doj, esti solidaraj kun opinio de plimulto. Pli da organizeco, fortigu vicojn!

*Nik. Ĥolm*, Kiev.

## La lingva problemo

*Koncernas "Helpu la progreson!" el S. 34*

Mi estas simpla industria laboristo, senpartia revoluciema liberpensulo. Malgraŭ mi SAT-aniĝis nur antaŭ duonjaro, mi kuraĝas kontraŭdiri k-dojn Izgur, Kolĉinski k. c., opiniante, ke mi esprimas la opinion de multiuj.

Estas evidente, ke nia lingvo estas ankoraŭ malproksima de la perfekteco kaj senriproĉeco. Sed se ni ĉiumonate enkondukus novajn formojn, kies simpleco ofte estas maltrovebla, estus dubinde, ĉu nia juna SAT-konstruaĵo disvolviĝos dezirinde, ĉar la plimulto de la SAT-anoj estas simplaj laboruloj, kiuj malfacile lernadis la lingvon kaj pli malfacile kutimiĝas al t. n. simpligoj. Ke "kvin-aŭ seplitera vorto estas pli facile lernebla kaj memorebla ol resp. naŭ-aŭ deklitera," estas evidente, sed kiamaniere ĉi-tezo pruvas la avantaĝon de la "e" - propono? Laŭ niaj varmegaj reformeguloj ĉi tezo sonus tiel: "kvin -e seplitera vorto estas . . . ol resp. ne- e deklitera". Bone e ne? Ke "ne" estas samtempe nea vorto kaj numeralo, ne domaĝas ja! La difino de diferenco estas sana kaj salutinda mensekzercado!

Havinte antaŭ nelonge lekcion pri lingvaj problemoj kaj demandoj (mi estas sekretario de Lab.-Esp.-Soc.) mi post fino restigis la aŭdantojn kaj skribis sur la tabulon la vortojn "balde, morge, anstat, hiere, difero, konfero, komito," doninte 10 min. por difini ilin. Oni opiniis la kvar unuajn kiel ne-esperantaj, la lastan kiel nekonata kaj la du ceterajn kiel strangaj kunmetaĵoj (di- kaj kon-fero). Ankaŭ la 6. tezon mi kontraŭas. Esp-o estas ankoraŭ eta kreskaĵo; se ni ĉirkaŭtranĉus ĝin por doni al ĝi pli belan aŭ simplan formon, ni velkigus ĝin; vi, k-doj reformeguloj, paciencu kaj iam belformigu la fortikan arbon (se tio necesos)!

Tiom al k-doj Izgur, Kolĉinski k. c. Ĝenerale mi protestegas kontraŭ laŭnacilingvaj arbitraĵoj kaj malnecesaj novaj vortoj. La esprimo "mortpafi" modifita laŭ ruslingva разстрѣлять = dispafi estas mallogika. Oni povas dispafi konstruaĵon aŭ eĉ taĉmenton, sed ĉu opan homon?

La germanizo de la esprimo *signalvorto* = *lozungo* estas superflua; se aperos novaĵoj kiel ekz. "ŝlagvorto, ŝtiĥvorto," mi tute ne miros.

Ankaŭ la arbitran anstataŭon de la substantiva finaĵo — o per apostrofo (SR maja, "La blanka venĝo" kaj "Ni iras") mi opinias superflua kaj eĉ malbela.

*Kortegano.*

## Konferenco de la Turista Asocio "La Naturamikoj"

en Wien okazos de la 5-a ĝis la 8-a de julio kaj estos aranĝota aparta kunveno por Esperantistoj. Ĉiuj alvenontaj gesamideanoj estas petataj informi la Esperanto-Grupon de la "Naturamikoj" pri ilia partopreno al adreso de s-ano *Alfred Klein, Wien, II.*, Pazmanitengasse 10/21.

# KRONIKO

### Sovet-Unio

*Belaja Cerkov.* Helpe de Kieva gub. fako la movado estas reorganizita. En vilaĝo Ŝkarovska mi sukcesis organizi esp. rondon kun 12 k-doj. En Centra Lab. Klubo de B. C. organiziĝis studgrupo el 20 k-doj. Komjunularo en Ŝkarovka nun interkorespondas esperante kun alilandaj junuloj.

*Kazanj.* Eldonita de la loka filio de *Odvf* (Amikaro de avio) avio-kalendaro por 1925 j. enhavas krom artikolo pri Esp-o kaj avio ankaŭ rus-esperantan avio-vortaron, kompilitan de nia k-do Lidin.

*Minsk.* 28.—29. V. okazis unua tutblankrusa Konferenco de Sovetl. Esp. Unuiĝo. Partoprenis 38 delegitoj el tuta Blankrusio. El Moskvo de CK SEU vizitis konferencon k.do Ŝabarin, el Krimeo k-do Ŝaber. La konferenco estis unua revolucia kuniĝo de espistoj en Blankrusio kaj montris veran revoluciiĝon de nia laboro. Konferenco havis en ĉiuj demandoj veran unuanimecon kaj ĉiuj plej diskuteblaj problemoj estis solvitaj unuvoĉe. Unuan tagon okazis salutparoladoj, i. a. de ILH-reprezentanto kaj de SAT-reprezentanto, kaj koncerto. Duan tagon sekvis laborkunsidoj. Raportoj montris interesan bildon de vigla kaj fruktodona laboro en laborista kaj vilaĝana medio. K-do Klys parolis pri organiza problemo. Poste estis raportoj pri "nuna situacio de esp. movado en la mondo" kaj pri metodoj de instruado en kursoj kaj en ĉeletoj. Lasta demando estis elektoj de oficialaj gvidorganoj. Poste k-do Klys donis informon pri V-a SAT-kongreso, kiun vizitos kelkaj kamaradoj. — Nia konferenco estas nia unua venko!

*D. Sn.*

*Moskvo.* Eldonata de Popolkomisario por Poŝtoj kaj Telegrafoj kaj Societo de radioamikoj revuo "Radio" sin turnis al C. K. SEU kun la peto redakti tutan paĝon en ĉiu numero de tiu dusemajna revuo, disponigatan por propagando kaj instruado de Esperanto.

*Odessa.* 21. V. K-do Ŝaĥnoviĉ prelegis pri Esp-o kaj SAT en komuna kunveno de laboristoj ĉe la 9-a Regna Metal-uzino je nomo de Kalinin. Post la raporto la kelkcenta aŭskultantaro akceptis jenan rezolucion: "konsiderante la tutan gravecon de internacia lingvo por internacia proletaro, la ĝenerala kunveno decidis: 1. Ĉiamaniere subteni la laboristan esperanto-movadon, precipe en la demando pri enkonduko de Esperanto en lernejojn; 2. Organizi kurson de Esperanto; 3. Ligiĝi kun Sennacieca Asocio Tutmonda por interŝanĝi siajn spertojn kaj informojn pri laborista vivo."

22. V. kunveno de Junul-komunistoj ĉe la sama uzino rekomendis al siaj membroj aniĝi al esp-kurso. En la fabriklernejo ĉe la sama uzino Esp. estas instruata. 4. VI. k-do Ajzberg prelegis pri Esp-o ĉe Centra Laborista Biblioteko, kie komenciĝis jam la 4-a grupo de Esp-kurso.

## Alvoko

La Gildo de Junularo de la Brita Sendependa Laborista Partio (I. L. P.), kiu nun uzas oficiale Esperanton, baldaŭ eldonos monatan jurnalon "The Flame" (la Flamo) por la Brita socialista junularo. Ĝi enhavos esperantan sekcion kaj Internacian fakon. Por tio estas necese havi korespondantojn en ĉiuj landoj, kiuj volas sendi periode novaĵojn pri la stato kaj aktiveco de la eksterlandaj soc. junularaj movadoj. Se oni dezirus, la internacia korespondanto de "La Flamo" volonte interŝanĝos kun siaj kunlaborantoj. Plue, li volos sendi senpage ekzemplerojn de "La Flamo" al tiuj redaktoroj aŭ eldonistoj kiuj sendos al li siajn socialistajn junularajn jurnalojn. Kamaradoj, tiam konigu vian komplezemon per frua respondo al k.do *Arthur Tetley*, Frenchmans Bay, *So. Shields*, England.

# V. Kongreso de SAT

## Wien, 11.—15. aŭgusto 1925

### Propono N-o VII

### Pri la "lingva taktiko" de SAT

La fakto, ke SAT ĝis nun ne formulis klare sian rilaton al diversaj lingvaj tendencoj ekzistantaj en la Asocio, kaŭzas lastatempe plurajn miskomprenojn kaj misagojn. Konsiderante, ke tia stato estas nepre likvidenda, la ĉi-subskribintoj opinias, ke estas necesa serioze pridiskuti la "lingvan taktikon" de SAT en la proksima kongreso. Siaflanke ili esprimas sian vidpunkton pri tiu-ĉi temo en la sekvantaj tezoj. (La granda amplekso de l' temo kaj samtempa deziro ŝpari lokon en la gazeto devigas prezenti nur tezojn. Se la diskuto, kiun ĉi-tezoj certe elvokos, postulos detaligojn kaj konkretigojn, tio estos farita en specialaj artikoletoj laŭbezone).

1. Laŭ sia genezo kaj evoluo esp-o estas produkto de la procedo de kultur-internaciiĝo, kiu aperis kun la disfloro de l' kapitalismo, progresas en la periodo de imperialismo kaj tendencas finmaturiĝi en socialisma socio.

2. La sorto de esp-o, kiel elemento de la moderna scienca-teknika progreso, estas forte interligita kun la sorto de l' tuta moderna scienca-teknika kulturo.

3. La proletaro, kiel klaso ascendanta (supreniranta, progresanta), estas en la nuna historia periodo la portanto de l' scienca-teknika progreso kaj de l' internacia kulturo. Samtempe la burĝaro, klaso descendanta (malsupreniranta, malprogresanta) kun ĉiu tago fariĝas pli kaj pli konservema kaj reakciema ne nur en la sfero de l' soci-politika vivo, sed ankaŭ en la sfero kultura.

4. La efikoj de la ideologio kaj de l' "kultur-taktiko" de ĉiu klaso estas rimarkeblaj en ĉiuj branĉoj de l' kultura vivo; la internacilingva movado ne faras escepton ĉi-rilate.

5. La burĝaro en sia maso negative rilatas al esp-o kaj al lingvo internacia ĝenerale. La idealiste-pacifista propagando de la etburĝaj pioniroj de l' esp-a movado nemulte efikas en ĝiaj rondoj. Nur la ekonomia neceso devigas la burĝaron iom post iom alpreni esp-on por uzi ĝin en siaj komercaj kaj aliaj aferoj.

6. La et-burĝa intelektularo kaj la burĝaro, en kies manoj la esp-a movado estis dum longedaŭra tempo, enportis en tiun movadon sian ideologion ne nur en la formo de l' t. n. "neŭtralismo" (kiun la proletara esp-istaro organizita en SAT estas jam forlasinta), sed ankaŭ en pli vualita formo de l' t. n. "fundamentismo" (ĝis nun reganta en niaj rondoj).

7. La t. n. "fundamentismo" estas esence konservema, reakcia kaj ne-scienca lingva tendenco, kiu malhelpas la evoluon de esp-o. La "fundamentismo" estas efektive pseŭdo-fundamentismo; ĝi ne konformas kun la kompreno, kiun diktas la lingvoscienco kaj kiun havis pri la lingva evoluo la iniciatinto de esp-o — Zamenhof — mem; anstataŭ obeo al certaj fundamentaj struktur-principoj de la lingvo, celanta konservi unuecan bazon por la senĉesa evoluo de l' vivanta lingvo, la pseŭdo-fundamentistoj faris el la malnovaj lingvaj formoj fetiĉon kaj grave malhelpis al la lingva progreso. La ideologia bazo de tiu-ĉi pseŭdo-fundamentismo estas la statika pensmaniero, kiu estas propra al la burĝa klaso kaj ĝia intelektularo.

8. La pseŭdo-fundamentismo malutilis al esp-o ne nur pro tio, ke ĝi malhelpis la lingvan progreson, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi estis la objektiva kaŭzo de l' reformisma ido-movado.

9. La idista pozicio en la internacilingva movado estas ne malpli erara kaj ne malpli nescienca ol tiu pseŭdo-fundamentista: akceptante konstantan po-pecan per-dekretan reformadon de la lingvo, ĝi kondamnas ĉilastan (la lingvon) por resti ĉiam reformata lingvo-projekto kaj neniam estiĝi konstituita lingvo vivanta. (Cetere, la idistoj, enkondukinte la "periodo di stabileso" kaj ĉiam plilongigante ĝin, per tio mem konfesis ĉi-tiun principan eraron de l' idismo kaj fariĝis "Ido-fundamentistoj"). La ideologia bazo de l' idismo estas la intelektula racionalismo.

10. Laŭ sia strukturo esp-o plene konformas kun la principoj, sur kiuj — laŭ la lingvoscienco — estas bazenda la lingvo internacia. Sed la teoria kritiko de esp-o kaj ĝia praktikado pruvis, ke, estante strukture tute kontentiga, esp-o enhavas tamen plurajn difektojn en siaj detaloj; ĉi-difektoj estas forigendaj (per la rimedoj de l' interna lingva tekniko sen tuŝo de la fundamentaj struktur-principoj de la lingvo) kaj estas forigataj en la procedo de la lingva evoluo.

11. La sciencaj studoj pri esp-o (R. de Saussure, H. Sentis, P. Christaller k. a) malkovris la plej gravajn struktur-principojn, sur kiuj estas bazata la gramatiko kaj la leksiko (kun la vortfarado) de esp-o. Rompi tiujn-ĉi struktur-principojn per reformoj en la nuna momento, kiam esp-o estas jam lingvo vivanta, signifus pereigi la lingvon, retroirigi ĝin de la nuna stato al la stato embria, al la stato de nevivanta kaj tial reformebla lingvoprojekto; tio signifus nuligi la laboron de jardekoj. Ni devas konservi la fundamentajn struktur-principojn de esp-o kaj sur ili, kiel sur firma bazo, evoluigi la lingvon; pliriĉigi

# ABC de profmovado

de *Ĉekin-Jarockij*

2) (Daŭrigo)

Krome ni trovas rimarkeblajn signojn de influo de tiu modelo ankaŭ en la alilanda profmovado. Tiel en Francio dum Napoleono III la laboristaj delegitoj, senditaj al la tutmonda ekspozicio Anglion, retroportis kun si ne nur raportojn pri la sukcesoj de la industria tekniko, sed ankaŭ sciigojn pri la konstrumaniero kaj la sukcesoj de l' anglaj unuiĝoj. Kaj dank al la "paca" kaj "apolitika" (neŭtrala) karaktero de la tredjunionoj, kiuj estis garantiantaj al sia anaro sufiĉe rimarkeblan plibonigon de la situacio, al ĉi-tia tipo de profunuiĝo ankaŭ bone rilatis la reprezentantoj de la registaro. La registaroficisto Devenk kaj la prefekto de la II. Pariza rajono Levi opiniis necese eĉ mem partopreni la vastigadon en Francio profunuiĝojn, similajn al tiuj de Anglio. Kaj la harmonio inter la karakterizo, kiun faris la laboristaj delegitoj kun la protektanta politiko de l' registaro, kaŭzis aktivan imitadon de l' angla modelo. Same en Germanio la partopreno de la laboristaj delegitoj en Londona ekspozicio ludis analogian rolon kaj helpis al konatiĝado de l' germana laboristaro kun la sukcesoj kaj unuiĝkonstruado de l' anglaj Tred-junionoj. Samtempe la elmigrinta Londonon Vilhelm Libkneĥt, longe tie loĝinta kaj havinta eblecon senpere konatiĝadi kun la praktiko de l' angla profmovado, kune kun Aŭgust Bebel raportadis pri tred-junionismo dum multaj laboristaj kunvenoj. Fine en Usono la tuta dumiliona profunuiĝanaro formanta la Amerikan Laborfederacion estas ĝis nun organizita same kiel unuiĝis sian anaron la Am. Soc. de Mek. ankoraŭ en la 50-aj jaroj de la XIXa jarc.

Kion do prezentis la "Amalgamsocieto de Mekanikistoj", ludinta tian gravan rolon en historio de l'monda profmovado.

Komence ĝi estis unika asocio kun unika kaso, kien oni portis la kotizojn kaj per kiu oni estis pagintaj ĉiujn elspezojn eĉ por kancelariaĵoj kaj inko, kiun uzis la faksekretario. La fako elektas kaj kontrolas siajn proprajn laboristojn, sed agas ĉiam laŭ regularo, kiu antaŭvidas ĉiun plej malgrandan detalaĵon. Eĉ unu centimo ne povas esti elspezita, se ĝi ne respondas al la regularo. Kiel profunuiĝo la Asocio estis treege centralizita organizaĵo. Ĝia plej grava tasko estis — egaligi en la tuta lando la t. n. "realan laborpagon". Estas rimarkinda la aristokrateca ŝlosiĝo", la gildeco de tiu "ĉi perfekta modelo" de profunuiĝoj. Ĉi gildeco montriĝis ankaŭ en la alteco de la kotizo, kies amplekso estis fiksita sama (egala) por ĉiuj anoj, sendepende de la laborenspezo. Pro tio la malpli bone salajritaj laborgrupoj apartiĝadis de la unuiĝo. La samo montriĝis en konscia eksigo el la unuiĝaj vicoj tiun, kiu ne apartenis al certa grupo de altkvalifikitaj laboristoj. Tio kaŭzis dispolvon de la movado. En Anglio en 1920 estis 1214 unuiĝoj. Tiu abundeco montras, ke ĉiu unuiĝo — kaj plejparte ili estis tutanglaj — kunligas laboristojn ne de sama produktaĵo, profesio, sed nur laŭ specialeco. Tie ĉi ankoraŭ en 1922 ekzistis tielaj tutanglaj unuiĝoj, kiel "Unuiĝo de mekanikistoj ĉe l' akvodeverŝantaj maŝinoj de karbminejoj" — t. e. Unuiĝo de malgranda grupo de specialistoj.

Originala estas ankaŭ la politiko de la tred-junionoj. Ĝi ne estis bazita je kontraŭbatalo la kapitalismon. Ĝi klopodis garantii la interesojn de sia anaro unue, efikante la laborkampon, due, organizante memhelpadon. La unua metodo konsistis en tio, ke neatendita mallongigo de laborpropono sur laborkampo aŭ komuna striko de laboristoj estis anstataŭanta *per reguligo de laborpropono en koncernata laborspeco.* Kiel do la tred-juniono reguligas ĉi-proponon? Ĝi klopodis pere de kolektiva kontrakto limigi la kvanton de l' lernantaro. La kvanto de lernantoj ĉe ĉiu laboristo estis difinita tioma ke la kvanto de l' laboristaro en certa specialaĵo neniam malgrandiĝu, sed ankaŭ ne tromultiĝu. Kaj multaj unuiĝoj tion atingis. Ekzemple, Londona Societo de Kompostistoj fiksas en siaj kolektivaj kontraktoj la kvanton de lernantoj por ĉiu entrepreno kaj la daŭron de la lernado tiom ĝuste, ke ĉiun laboriston, elirantan el la laborvicoj anstataŭas nur unu kandidato. Memkompreneble, ke dum la plialtiĝo de la postuloj en tiu laborspeco, la laboristoj-specialistoj pro sia malmulteco eblas garantii al si pli bonajn lukondiĉojn. Sed por ke tiu metodo estu perfekta, necesas, ke profunuiĝanoj estu nur laboristoj de malarĝa specialeco, ricevantaj preskaŭ egalan laborpagon kaj havantaj la saman kvalifikecon.

(Daŭrigota

kaj progresigi ĝin, enkondukante, kiam tio estas necesa, novajn gramatikajn formojn, novajn radikojn, plisimpligi la ekzistantajn ktp. La viva praktiko kribros tiujn-ĉi "novajojn"; la plej taŭgaj enpenetros kaj elpuŝos la malpli taŭgajn, la netaŭgaj, estante nevivkapablaj, malaperos. Tiamaniere la lingvo vivos kaj konstante perfektiĝos.

12. La "lingva taktiko" de SAT devas esti bazata sur la dinamika pensmaniero de l' proletaro, sur ĝia sole scienca ideologio; ne statika, konservema pseŭdo-fundamentismo, kaj ne pseŭdo-revolucia reformema idismo, sed science bazita dinamika "evoluismo" kiu estas samtempe la vera fundamentismo. Libera konstanta evoluo de l' vivanta lingvo estu akcelata, kaj la konscia kontrolo de la uzantoj de l' lingvo zorgu, ke la unueco de la lingva strukturbazo estu asekurita en tiu-ĉi evolu-procedo. La SAT-eldonajoj estu progresigiloj, evoluigiloj kaj kulturiloj de la lingvo.

13. Konkrete: SAT permesu en siaj eldonajoj la plej larĝan, la plej liberan uzadon de novaj lingvo-formoj, se ĉi-lastaj ne kontraŭas al la fundamentaj struktur-principoj de esp-o. Samtempe SAT kreu specialan organon por reguligi kaj organizi la procedon de la realigo de sia "lingva taktiko."

*J. Zilberfarb (1334), E. Spiridoviĉ (3712), J. Voleviĉ (5084), N. Karmanov (5090), Ĥ. Bobrov (5091).*

### Propono N-o VIII

## Pri la stilo de l' SAT-eldonajoj

Al multaj kamaradoj ne plaĉas la stilo de l' SAT-eldonajoj. Ni opinias, ke la problemo pri la stilo de niaj eldonajoj estas tre grava, ĉar de ĝi grandaparte dependas la efiko de nia kultura laboro. Ni proponas al la SAT-anaro pritrakti tiun-ĉi problemon kaj ekspozas la jenajn konsiderojn pri ĝi:

1. Antaŭ ĉio estas necesa distingi stilon kaj lingvajon. Stilo estas maniero skribe aŭ parole esprimi siajn pensojn kaj lingvajo estas la lingva materialo, kiu estas uzata por tiu celo.

2. En nia literaturo ni rimarkas du kontraŭajn tendencojn. La unua, dezirante krei stilon "sciencan", trouzas specialajn terminojn (ne donante ties klarigon) kaj esprimas siajn ideojn tiel komplike, ke la teksto fariĝas tute nekomprenebla por meza leganto de l' SAT-eldonajoj, eĉ se tiu leganto bone posedas la lingvon. La dua, dezirante uzi stilon "popularan", kontraŭe — evitas sciencajn terminojn, kiam ili estas absolute necesaj kaj kreas stilon barbare-vulgaran.

3. Ambaŭ tendencoj, kiuj apartigas la stilon "sciencan" de l' stilo "populara" estas kondamnendaj de SAT; ili estas esence kontraŭproletaraj, ĉar ili kondukas al konstantigo de la divido inter la laboristaro kaj la intelektularo.

4. Vera populareco tute ne kontraŭas sciencecon. La stilo de l' SAT-eldonajoj devas esti vere populara, t. e. klara (komprenebla por ĉiu persono posedanta la lingvon) kaj scienca (precize ekspozanta sciencajn konojn); neniam estu permesata malutila komplikigo aŭ vulgarigo.

5. La stilo de l' SAT-eldonajoj povas varii depende de la temo traktata de la lingva riĉeco kaj de la individueco de l' aŭtoro; sed verkanta SAT-ano ĉiam zorgu, ke lia stilo estu vere populara, t. e. klara kaj scienca.

*J. Zilberfarb (1334), E. Spiridoviĉ (3712), J. Voleviĉ (5084), N. Karmanov (5090), Ĥ. Bobrov (5091), Kancelarskij (5015).*

### Propono N-o IX

## Horsektoroj

*Propono de Irkutska SAT-grupo.*

Anstataŭ malnovaj satsektoroj, kies limoj estas tute hazardaj kaj ne memoreblaj, ni renovigas proponon de Krjukov (vidu n-o 10 de SR 1924) akcepti por SAT horsektorojn, kiuj estas praktike difinitaj kaj internacie konataj kaj uzataj jam antaŭ longe. Unua kembriĝa sektoro estes nula kaj kembriĝa meridiano iras ĝian mezon. Ĉiu sektoro longitudas 15 gradojn kaj tial tempdiferenco inter najbaraj sektoroj egalas ĝuste unu horon. Ĉiu satano apartenu al tiu sektoro, kies tempon li uzas.

---

*Klariga noto de Krjukov*

Satkongresanoj, oni akuzas nin pri fantaziemo, idealismo kaj por pruvi ĝin oni ofte montras al ni nian hazardan kaj nepraktikan sektorecon. Oni diras: "via sennaciismo estas same senbaza kaj fantazia kiel limoj de viaj sektoroj". Vi sensencigos ĉi argumenton se vi akceptos nian proponon ĉar horsektoroj havas evidentan materian bazon. Ili estas kaŭzataj de urĝaj ekonomiaj bezonoj de ĉiuj terglobanoj kaj ignoras naciajn kutimojn pri tempo same kiel ni ignoras naciemon por akceli klasbatalon. Por rebati pluajn atakojn de niaj "prudentaj" malamikoj, kiuj "marksisme" pruvas, ke sennaciismo povas naskiĝi nur post kiam ekregos socialismo, diru al ili jenon:

Rusaj bolŝevikoj fariĝis ateistaj kaj internaciemaj ne post Revolucio, sed antaŭ ĝi. Por ribeli kontraŭ malnova burĝa ordo ili devis antaŭe ekmalami ĝin kaj ĝian idearon. Religiema kaj naciista revoluciulo estas absurdo ĉar Revolucio psikologie ne povas esti entrepreno de kontentaj kaj malvarmaj sencelulo), kiuj baziĝas sur nacio, sed ne sur klaso fakte staranta ekster nacio. Sennaciismo same kiel komuna lingvo, ateismo kaj ideoj pri socialismo naskiĝas en Malnovo. La Novo nur oficialigos ilin per Revolucio kaj poste vastigos kaj profundigos. Suspektindaj estas ti-kiuj forpuŝiĝas de ni pro nia sennaciemo, ĉar ilia psikologio ne povas igi ilin al Revolucio.

# KORESPONDADO

### TARIFO

**Korespondado: Unu enpreso:** Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

*MALLONGIGOJ:* L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.ajo = *esperantajo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

**Brazilo**

— K-do *Christian Schmid,* Rua 15 de Novembro, N-o 92, a. c. do sur. Ravache, *Joinville,* Estado de Santa Catharina, dez. koresp. nur k. seriozaj k-doj ĉiul.

**Germanio**

— K-do *Alfred Kraushaar,* Kurfürstenstr. 74, *Berlin-Mariendorf,* post reveno el la malsanulejo salutas siajn korespondantojn kaj promesas nun regulan resp.

— Kelkaj naturamikoj dez. koresp. pri naturbeleco, ekskursoj faritaj ktp. interŝ. L, PK, PI, fot-ajojn k. ĉ. l. certe resp. Adr.: Esp. Naturamik-sekcio, *F. Müller,* Münchner Str. 14 ½ I. l. *Ingolstadt.*

**Litovio**

— K-do *Jonas Snarskis, Mariampolo,* "Dirvos" sp., dez. koresp. kun anarkistoj kaj komunistoj pri teorio.

**Sovet-Unio**

— K-do *Nikolaj Pavlovskij,* ul. Bebelja, 23, *Viteksk,* dez. koresp. pri lab. movado, elektroteknikо k. sporto.

— K-do *Belakov Bazilo,* Kolektivnaja, 2, *Tuapse,* Kaŭkazo, dez. havi laboristajn korespondantojn el ĉiuj landoj.

K-do *Bojev Sergeo* (20 jara veterinaro), Veterinarn. ambulat., *Turkestan,* Kazaka SSR, pri veterinarismo, brut- kaj bird-edukado, kamparana mastrumado, naturo, studentjunula vivo, moroj de loĝantaro, esp. movado k. a. t. L, PI.

— K-do *Ĥolm Nikolao,* 9, Voznesenskaja, Demievka, *Kiev,* pri violonmuziko, PI kun urbvidajoj kaj korpskulptajoj

— K-do *Azovski Gregoro,* Sovpartŝkola, Sovetskaja ul, *Ijevsk,* Votsk. obl, pri politiko k. al. temoj. L, PK, PI, Respondo akurata.

— Pro unu grava kaŭzo mi ne povas respondi al miaj korespondantoj. Pardonu! *S. Sariĉev, Astrahan.*

— K-do *Kapustinskij Paŭlo, s. Lozovatka,* Krivorogsk. okr. Ekater. gub. pri div. temoj k. ĉ. l.

— K-do *Birjakov* Evgenij, Pavloviĉ, Furŝtadskaja, ul. 16, kv. 6, *Leningrad,* dez. serioz. koresp-adon pri organizo de kancelaria laboro en fervojaj oficejoj k. ĉ. l.

# AMUZA ANGULETO

### Ŝarado n-o 1

Mia unua parto estas pronomo.
Se vi scias duan parton vi scias kazon.
Tria parto estas trilitera adverbo.
Tuto ĉiam regas ĉe polusoj.

*Verkis Niĉjo Kopilov.*

### Ŝarado n-o 2

Unuan parton mian havas ĉiu regno.
Dua parto estas bone konata metalo.
Tuto estas preskaŭ donaco.

*Niĉjo Kopilov.*

### Duobla problemo

Baaaakllmnopk,
Naaiegolmrs;
Kaeiiussmnĝ,
Toaeiukmnprs.

El ĉi tiuj 47 literoj formu kvarlinian verson — enigmon kaj poste solvu la enigmon. Grandaj komencliteroj kaj lasta litero s estas metitaj ĝustaloke. Rimiĝas nur du lastaj linioj.

*Verkis Alĉjo Redozubov.*

### Liter-problemo

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| b | o | r | o | r | o |
| r | e | r | o | e | |
| b | l | e | r | | |
| e | o | b | | | |
| o | i | | | | |
| i | | | | | |

Metu la literojn en la kvadratojn por ke ili legitaj dekstren horizontale kaj vertikale formu 6 apartajn vortojn. Unu el ili estas frukto de kreskajo kaj du aliaj estas nomoj de literoj.

*Verkis Valĉjo Suhov.*

**Por la baloto de l' Direkta Komitato limtempo ĝis 1. aŭgusto.**

**Laboristkorespondantojn**

pri laboristkorespondanta movado en la kapitalistaj landoj kaj

**Militarmeanojn esp-istojn**

pri vivado kaj militlernado de militarmeanoj, pri interrilatoj de soldatoj kaj oficiroj, pri disciplino, politiklaborado kaj revolucia movado en armeoj de kapitalistaj landoj petas skribi k-do Nikolskij. Adreso: Sovet-Unio, Smoljensk, Socialistiĉeskaja ul. 3, redaktejo de l' gazeto "Krasnoarmejskaja Pravda" ("Ruĝarmeana Vero") al R. B. Nikolskij.

Ĝenerale estos interesaj korespondajoj el vivado de *pola, rumana, latvia, litovia kaj esta armeoj. Ĉiuj ricevotaj leteroj estos uzataj por presado en ruĝarmeanaj gazetoj.*

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG